Karaj gesamideanoj,

Plej unue mi kore dankas Organizan komitaton de UkrEA-kongreso, speciale s-ojn V.Pacjurko, Z. Pelo,V. Voroblevskij, A. Kalaŝnikova, Z. Mazepa kaj ĉiujn partoprenintojn de la kongreso, sen kiuj la kongreso mem estus sensenca.

Mi konfesas ke tiu kombinaĵo samtempe de la kongreso, inauguro de la memortabulo al V. Eroŝenko kaj AMO-seminario okazis strecĥa, interesa, buntoplena de impresoj kaj fine efektiva.

Mi devas aldoni ke multajn konsilojn praktikajn ĉi-rilate antaŭ la kongreso donis al mi estimataj gesinjoroj Ivan Svarnik - direktoro de Lviva provinca scienca biblioteko, Jurij Kohĥ - fama arkitekto, filo de eminenta lviva esperantisto KOHĤ, Natalia Bunda - ĉefo de la departamento pri kulturo de Lviva urbodomo.

Neniam ĉio glatas, sed ni klopodis fari tiun laboron kaj feston diligente difrakte niajn eblecojn en la realon.

Ni scipovas pli multe se donos niajn fortojn al la prospero de la movado sed ne al unuopaj ambicioj kaj grumblado.

La sperto de spertuloj devas labori por la movado ne farigĝante mentoro surĉiela.

Mi kredas ke ĉi-jara kongreso kreos novan efektivan teamon kun novaj pli junaj ventoj.

Sed antaŭ ĝi ni havas belan jubileon maje ĉijare - 30-jarigĝo de Ukrainia esperanto asocio (UkrEA).
Rememoroj de partoprenintoj kaj ne nur estas bonvenataj. Ankaŭ Historia komisiono ne forgesu pri tio.

Estas planata speciala eldono de Helianto!

Euheno Kovtonjuk,
UkrEA-prezidanto